

Terminareto pri tradukado

Kompilita de Roel Haveman
Ĉinigita de Minosun

e-Librigita de ELERNO

nov. 2010

Aldonaĵo 添加 *Addition*. Signifohava ero en la [celteksto](#), kiu mankas en la [fontoteksto](#). Se la tradukisto sentas la bezonon aldoni informojn, li faru tion prefere en [komentario](#). Kp. [preterlaso](#).

Ambigueco 歧义 *Ambiguity*. Plursenceco. Se temas pri beletraj tekstoj, tradukistoj kutime provas redoni la ambiguecon en la traduko. Sed ekz-e teknikaj, juraj aŭ medicinaj [fontotekstoj](#) kutime ne estu plurmaniere interpreteblaj. Se aperas tia miso, necesas ke la tradukisto kontaktu la aŭtoron por klarigi la aferon. Kp. [homonimeco](#).

Analizi 分析 *Parse*. Per [tradukilo](#) diserigi [fontotekston](#) en [segmentojn](#). La tradukilo kutime decidas pri intersegmentaj limoj surbaze de la ĉeesto de iuj interpunkciaj signoj (punktoj, duoblaj punktoj) kaj stirsignoj (alinesignoj, taboj). Ofta eraro dum la analizado estas, ke la tradukilo distranĉas ĉe mezfraza mallongigo pro la ĉeesta(j) punkto(j). Kutime tiaj eraroj korekteblas dumtraduke.

Arkaismo, arĥaismo 废旧词, 古语词 *Archaism*. Eluziĝinta vorto aŭ vortformo. Tradukistoj povas uzi arkaismojn por redoni malnovecan etoson. En Esperanto tio estas malfacila, ĉar Esperanto havas relative malmultajn arkaismojn. Tiucele oni kelkfoje elpensas [neologismojn](#), kiuj rolu kiel kvazaŭarkaismoj.

Arta tradukado 文学翻译 *Artistic translation*. [Tradukado](#) ĉe kiu oni provas reprodukti ĉiujn estetikajn kvalitojn de la [fontoteksto](#). Kutime temas pri tradukado de beletro: prozo, dramo, poezio, muzikaĵoj.

Asimilado 本土化, 本地化[A] *Localization ("L 10N")*. Adaptado de programaro (kaj precipe de ties uzulinterfaco) al la kutimoj kaj normoj de iu etno. Temas ne nur pri la lingvo, sed ankaŭ pri la [lokaĵaro](#). [Tradukado](#), [postredaktado](#), [reviziado](#) kaj [kvalitkontrolo](#) estas partoj de asimilado. Asimilado sekvas la procezon de [internaciigo](#).

Aspektigo 版面编排 *Layout*. La grafika prezentado de tekstoj. Ofte en la [celteksto](#) oni konservas la aspektigajn informojn de la [fontoteksto](#).

Atestita tradukisto 注册翻译师 *Certified/Accredited translator*. Diplomita tradukisto, kiu ĵuris antaŭ jura tribunalo aŭ alia instanco, ke li tradukos honeste. Ĉe oficialaj dokumentoj kaj kontraktoj oni kelkfoje petas aŭ postulas, ke ĝin traduku atestita tradukisto. Atestiteco tamen ne nepre garantias altkvalitajn tradukojn. Ĝenerale la [tarifoj](#) por atestitaj tradukoj estas pli altaj.

Celgrupo 目标群 *Audience*. Tiuj, kiuj legos aŭ aŭdos la tradukon. [Tradukisto](#) bone konsciis pri la celgrupo, por ke la vortelekto kaj stilo de la traduko povu esti efika.

Cellingvo 目标语言 *Target language*. Lingvo en kiun oni tradukas.

Celteksto 目标语言文本 *Target text*. Teksto, kiun oni kreas dum la tradukado. Oni nomas tian tekston ankaŭ "traduko", "rezulto" aŭ "celo".

Denaska parolanto 讲母语的人 *Native speaker*. Tradukisto, kiu denaske parolas la [cellingvon](#). Pro kvalitaj konsideroj, tradukkompanioj kutime postulas, ke iliaj tradukistoj parolu la cellingvon denaske.

Denotacio 外延 *Denotation*. La baza signifo de vorto. La vorto denotacio estas ofte uzata kontraste kun [konotacio](#), kiu estas grava koncepto por [tradukistoj](#).

Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT) 分布式语言翻译 (方案) *Distributed Language Translation (DLT)*. Projekto de la Eŭropa Komisiono, ĉe kiu oni esploris inter 1977 kaj 1990 la eblon duonaŭtomate [maŝine traduki](#) inter 12 lingvoj. Oni uzis variaĵon de Esperanto kiel [pontolingvon](#).

Dublado 配音翻译 *Dubbing*. Anstataŭigado de la [fontolingva](#) parolado de filmo per [cellingva](#) parolado. Bonaj dublotradukoj kiel eble plej sekvu la buŝajn moviĝojn de la aktoroj. Komparu: [subtitolado/subtekstigado](#) kaj [eksterscena voĉo](#).

Dudirekta kapablo 双向翻译功能 *Bi-directionality*. Kapablo de [tradukilo](#) trakti lingvojn kun malsamaj tekstdirektoj. Per programo kun tiu kapablo oni povas traduki inter ekzemple Esperanto (kiun oni skribas dekstren) kaj la Hebrea (kiun oni skribas maldekstren).

Eksterscena voĉo 画外音 *Voice-over*. Voĉo, kiu prikomentas surekranajn okazaĵojn aŭ kiu [simultane tradukas](#) diraĵojn. Traduki vidbendojn, filmojn kaj dokumentariojn per voĉaj komentoj estas teknike malpli komplike ol [dublado](#). Kp. [subtitolado/subtekstigado](#).

Ekstraktado de terminoj 术语提取 *Term extraction*. Procezo ĉe kiu aŭtomate ekstraktiĝas potence interesaj [terminoj](#) el tradukendaj tekstoj. La rezulto formas bazon por krei [terminaron](#), kiu ebligas al [tradukistoj](#) traduki pli [kohere](#). Ne konfuzu la ekstraktadon de terminoj kun [terminrekonado](#).

Ekvivalento 对等词 *Equivalent*. Vorto aŭ esprimo en unu lingvo, kiu signife plene identas kun vorto aŭ esprimo en alia lingvo.

Etikedoj 标签 *Tags*. Tradukante etikeditajn tekstojn, ekzemple HTML-tekstojn, oni bone sciuj, kiujn partojn de la etikeditaj tekstoj oni traduku kaj kiujn oni ne tuŝu. TRADOS TagEditor estas ekzemplo de [tradukilo](#), kiu estas aranĝita tiel, ke nur la tradukendaj partoj de la etikeditaj tekstoj estas alireblaj dum la tradukado.

En jena frazo, la tradukisto traduku nur la grasajn tekstojn:

Premu la ``-butonon por kopii la tekston.

Falsa amiko 假朋友 *False cognate*. Forme simila vorto el alia lingvo kun malsama signifo. Tradukeraro facile povas okazi se oni pro forma simileco inter [fontolingva](#) kaj [cellingva](#) vortoj, missupozas ke ili estas samsignifaj. Oni atentigu ekzemple ke la Esperanta vorto "farti" estas io tute alia ol la Angla "to fart" (= "furzi").

Fideleco 忠实 *Fidelity*. Sinonimo de [fidindeco](#).

Fidindeco 忠实 *Accuracy, faithfulness*. La grado en kiu [tradukisto](#) sukcesis konservi la ([intencitan](#)) [signifon](#) kaj/aŭ [formon](#) de la [fontoteksto](#). Ĉe la tradukado de prozo signifa fidindeco estas pli grava ol forma fidindeco. Ĉe poezio forma fidindeco ludas pli gravan rolon. Kelkfoje oni intence tradukas ne tute fidele, ekzemple ĉe [parafrazo](#) kaj [resuma traduko](#). Sinonimo: fideleco.

Flueco 通顺 *Fluency*. Natureco de la teksto. Traduko estas flua, se ĝiaj vortoj kaj gramatikaj strukturoj respegulas la ĉiutagan lingvouzon de la parolantoj de la [cellingvo](#). Rolas kriterioj kiel ekzemple vortelektado, longeco de la frazoj, vortordo, kutimeco de parolmanieroj, komprenebleco kaj klareco. Tro [laŭvorte tradukitaj tekstoj](#) kutime impresas malflujaj. Ju pli bone la [tradukisto](#) atentigas pri la [intenco](#) de la [fontoteksto](#), des pli flua iĝos la [celteksto](#). Ĉe bona traduko oni eĉ ne rimarkas, ke ĝi estas traduko.

Fontolingvo 源语言 *Source language*. Lingvo el kiu oni tradukas.

Fontoteksto 源语言文本; 原文 *Source text*. Teksto, kiun oni tradukas. Kelkfoje oni nomas tian tekston "originalo" aŭ simple "fonto".

Formo 形式 *Form*. La maniero en kiu io estas skribita aŭ dirita. En [celtekstoj](#) oni ofte devias de la [fontotekstaj](#) formoj por krei bonan [laŭsignifan tradukon](#). En poezio tamen, formaj aspektoj kiel ritmo en rimo estas konservindaj. Kp. [transponado](#) kaj [fidindeco](#).

Glosaro 词汇表; 注释表 *Glossary*. (1) [Terminaro](#), kutime en ĝia dua signifo. (2) Listo de [komentarioj](#) aŭ aliaj klarigaj notoj.

Gloso 注释 *Gloss*. Noto klariganta la sencon de vorto. Kp. [termino](#).

Heredaĵo 遗留项 *Legacy*. Tradukita frazo aŭ termino, kiu estis uzita ankaŭ en antaŭaj tradukoj. Heredaĵoj povas eniĝi en la tradukon per [recikligo](#). [Tradukilo](#) traktas heredaĵojn kiel [plenajn](#) aŭ [svagajn kongruaĵojn](#). Kp. [ripetaĵo](#).

Homonimeco 异义 *Homonymy*. La apero de homonimoj, t.e. samformaj vortoj kun malsamaj signifoj. Homonimeco malofte kaŭzas [ambiguecon](#), se estas sufiĉa subteno de la [kunteksto](#). Unu el la plej grandaj obstakloj por [maŝintradukado](#) estas la ĝusta interpretado de homonimoj.

Idiotismo 俗语, 成语 *Idiomatic expression*. Nelogika esprimo, propra al iu lingvo sed ne al aliaj. Idiotismoj ofte estas malfacile tradukeblaj. Parolantoj prefere evitu idiotismojn en [interpreta situacio](#).

Intenco 意图 *Intention*. La vera signifo kaj dezirata efiko de la teksto. Ekzemple en ironia teksto oni laŭvorte esprimas la malon de tio kion oni volas diri. Kelkfoje oni ne povas uzi en la [cellingvo](#) la samajn stilajn rimedojn kiel en la [fontolingvo](#). Tiam oni traduku ne [laŭvorte](#), sed [laŭsignife](#). Simile, tradukante laŭ la intencoj de la [fontoteksto](#), oni ne provu konservi neintencitajn lingvajn stumblojn, kiuj aperas en ĝi.

Interfaco 界面 *Interface*. Vd. [uzulinterfaco](#).

Interlinia traduko 逐行翻译 *Interlinear translation*. Formo de [vort-post-vorta traduko](#), ĉe kiu traduko aperas tuj sub la linioj de la [fontoteksto](#). Ĉi tiu formo de traduko povus esti utila ĉe la teknika pristudado de la fontoteksto.

Internaciigo 国际化[A] *Internationalization ("I18N")*. Adaptado de programaro al la bezonoj de plurlingva [asimilado](#). Ekz-e evitado de komplika [kroĉado](#), uzado de apartaj dosieroj por tradukendaĵoj, uzado de [Unikodo](#).

Interna referenco 交叉引用 *Cross-reference*. Referenco al alia loko en la sama verko aŭ programo. Dum la [postredakta fazo](#) oni zorge atentu, ke referencoj al ekzemple titoloj estas precize same vortigitaj kiel la titoloj mem.

Interpretado 口译 *Interpretation*. Buŝa [tradukado](#). Ekzistas du bazaj tipoj de interpretado: [samtempa](#) kaj [sinsekva interpretado](#). Kelkaj tipaj eraroj dum interpretado: [aldonoj](#), [preterlasoj](#), troa [resumado](#), [rolinterŝanĝo](#).

Interpretisto 口译员 *Interpreter*. Iu, kiu [interpretas](#).

Kalkeo 借用词 Vidu "[paŭsaĵo](#)".

Klavkomando 快捷键, 热键[A] *Hot key*. Klavo aŭ klavkombino per kiu oni povas ekigi komandon. En menuoj ĝin markas substrekita litero.

Kohereco 一致性, 连贯性 *Consistency/Coherence*. Eco de teksto, kiu rilatas al konsekvenca uzo de stilo kaj/aŭ [terminoj](#). En termine kohera teksto oni konsekvence esprimas samajn konceptojn per samaj terminoj kaj (en teknikaj tekstoj) samajn agojn per samaj frazoj. Termina kohereco malpliigas la ŝancon de [ambigueco](#). Stile kohera teksto alparolas la celgrupon en unu maniero (ekzemple en populareca aŭ oficialeca stilo). Kontribuas al kohereco la uzo de [tradukiloj](#), [terminaroj](#) kaj [stilgvidilo](#).

Komentario 附注 *Commentary*. Klariga noto ekster la kadro de teksto. Kp. [aldonaĵo](#).

Kompensado 补偿 *Compensation*. Kontraŭpezado de esprimrimedoj en la [fontolingvo](#), kiuj mankas en la [cellingvo](#). La tradukisto uzas esprimilojn kun la sama aŭ simila efiko. Ekz-e unu vortludon oni povas anstataŭigi per alia.

Komputilizita tradukado 计算机辅助翻译 *Computer aided translation (CAT)*. Apliko de komputiloj en la tradukprocezo. Uzante [tradukmemoron](#) kaj/aŭ [maŝintradukadon](#), tradukistoj povas labori multe pli rapide kaj [kohere](#).

Konkordanco 重要语汇索引 *Concordance*. Indekso de vortoj kaj frazpartoj el la [tradukmemoro](#). [Tradukiloj](#) ofte havas funkcion per kiu oni povas kontroli kiel specifa vorto aŭ vortgrupo estas tradukita ene de aliaj [segmentoj](#) en la tradukmemoro. Tiu funkcio helpas ĉe la kreado de termine [koheraj](#) tradukoj.

Konotacio 内涵 *Connotation*. Kromnocio, nuanco, kiu aldoniĝas al la [denotacio](#). Ekzemple "propagando" ne pure estas informado por disvastigi ideon: la vorto ekhavis malagraban konotacion pro ĝia uzo fare de nazioj. [Fidinda](#) traduko respegulas ne nur la denotaciojn de la [fontotekstaj](#) vortoj, sed ankaŭ la konotaciojn.

Kroĉado 粘着 [A] *Catenation, Concatenation*. Kungluado de vorteroj aŭ frazeroj. Kelkfoje programoj generas vortojn aŭ frazojn per kroĉado. Tia aranĝo estas malfacila por tradukistoj, ĉar ili vidas nur la nekompletajn erojn, eventuale kun [ŝtopaĵoj](#). Tradukado iĝas eĉ nebla, se la strukturo de la [cellingvo](#) tro diferencas de la [fontolingvo](#). Dum la [projektesploro](#) oni speciale atentu pri ĉi tiu problemo. Ekz-e la Anglajn tagnomojn "Sunday" (= "dimanĉo"), "Monday" (= "lundo") k.t.p. oni povas krei kunligante "Sun", "Mon" k.t.p. kun "day" (= "tago"). La traduko iĝus fuŝa, se la tradukisto senpripense tradukus la eron "day" per "tago".

Kunligado 合并 *Alignment*. Kunigado de [fontoteksto](#) kaj [celteksto](#) por krei [tradukmemoron](#). Dank' al kunligado oni povas krei tradukmemoron el tradukoj, kiuj estas faritaj sen helpo de [tradukilo](#). Ekzistas specialaj kunligaj programoj, sed tiuj kutime bezonas multan homan intervenadon. Ekzemplo de tia programo estas TRADOS WinAlign.

Kunsenco 内涵 *Connotation*. Sinonimo de [konotacio](#).

Kunteksto 语境 *Context*. La teksto, kiu ĉirkaŭas la tradukendan esprimon kaj kiu precizigas ĝian signifon. Ankaŭ aliaj cirkonstancoj kiel la celo, la temo kaj la epoko de la teksto apartenas al la kunteksto. [Tradukisto](#) kutime povas [traduki](#) unuopajn esprimojn nur, se li scias en kiu kunteksto ili estas uzataj.

Kvalitkontrollo 质量审查 *Quality assessment*. (1) Plej lasta paŝo en la tradukprocezo en kiu oni prijuĝas ĉu la [tradukita](#) kaj [reviziita](#) teksto estas tute preta aŭ ĉu necesas plia reviziado. (2) [A] La lasta [programkontrollo](#).

Laŭsignifa traduko 意译 *Idiomatic translation*. [Flua](#) kaj [fidinda](#) traduko.

Laŭvorta traduko 直译 *Literal translation*. Ofte [malflua](#) traduko, ĉe kiu oni kiom eble sekvas la strukturojn de la [fontoteksto](#) por esti [forme fidela](#) al la ĝi. Por ĉiu unuopa vorto oni kiom eble provas trovi [ekvivalenton](#) en la [cellingvo](#). Laŭvorta traduko povas servi kiel bazo por [laŭsignifa](#) aŭ [arta traduko](#) fare de iu, kiu ne konas la [fontolingvon](#).

Lokaĵaro 习惯 *Locale*. Kulturspecifa konvenciaro por la prezentado de ekzemple datoj, tempindikoj, monsignoj, dekuma signo, citiloj. Esperanto ankoraŭ ne konas tre fiksan lokaĵaron. Tial estas utile pritrakti tiajn aferojn en [stilgvidilo](#).

Malflueco 不通顺 *Choppyness, disjointness*. Nenatureco de la teksto. Vd. [flueco](#).

Maŝintradukado 机器翻译 *Machine translation*. Aŭtomata [tradukado](#) de unu homa lingvo al alia. Maŝintradukado povas asisti homajn tradukistojn kaj ĝi povas amase produkti preskaŭ senpagajn, sed kvalite subnivelajn tradukojn (ekz-e ĉe <http://lingvo.org/traduku/>). Ekzistas ankaŭ duonaŭtomata tradukado, ĉe kiu necesas homa interveno por solvi [ambiguaĵojn](#) (kiel ĉe la [DLT-projekto](#). Promesplena estas la uzo de maŝintradukado ĉe [fontotekstoj](#) en [regulita lingvaĵo](#).

Neologismo 新词 *Neologism*. Nove kreita vorto. [Tradukistoj](#) estas ofte tentataj krei novan vorton, kiam [fontolingva](#) koncepto ne estas unuvorte esprimebla en la [cellingvo](#). Ĝenerale estas tamen preferinde kiom eble trovi manieron esprimi - eventuale plurvorte - la koncernan signifon per la ekzistanta vortrezoro de la cellingvo. Tiam la rezulto estos pli nature komprenebla por la [celgrupo](#).

Parafrazo 释义, 意译 *Paraphrase*. Nesevera traduko, en kiu la [fontoteksto](#) estas plivastigita kaj klarigita. En parafrazaj tradukoj oni esprimas la saman signifon per aliaj vortoj, por servi al la bezonoj de speciala [celgrupo](#). Parafraza traduko utilas ekzemple kiam la celgrupo de la fontoteksto estas plenkreskuloj,

dum la celgrupo de la [celteksto](#) estas infanoj. Kp. [resuma traduko](#) kaj [fidindeco](#).

Paŭsaĵo 借用词 *Calque*. Laŭvorta traduko de [termino](#). Paŭsado estas konsiderinda ĉe fakvortoj, kiuj ankoraŭ mankas en la [cellingvo](#). Kelkfoje oni renkontas la priskriban terminon "prunta traduko" aŭ la neologismon "kalkeo".

Plena kongruaĵo 完全匹配 *Full match*. Vorto aperanta en [segmento](#), kiu en plene kongrua formo troviĝas en la [tradukmemoro](#). [Tradukiloj](#) ebligas al tradukistoj la reuzadon de [tradukunuoj](#), kies [fontotekstaj](#) segmentoj plene (aŭ [svage](#)) kongruas kun la tradukendaj frazoj. Vd. [ripetaĵo](#) kaj [heredaĵo](#).

Plurlingva tradukkompanio 多语言翻译服务商 *Multi-language vendor*. Tradukkompanio kiu tradukas tekstojn kaj [asimilas](#) programarojn en plurajn lingvojn samtempe. Ekz-o: *LinguaForce*: <http://www.linguaforce.com>.

Plurtavola grafikaĵo 分层图形 *Layered graphic*. Grafikaĵo kies tekstoj ne estas integritaj kun la bildo, sed aldonitaj en aparta tavolo. Ĉe plurtavolaj grafikaĵoj oni povas multe pli facile aldoni la tradukaĵojn.

Pontolingvo 中介语 *Intermediate language*. Intera lingvo en kiun oni tradukas por poste plu traduki en [cellingvon](#). En multlingva situacio la apliko de pontolingvo konsiderinde reduktas la nombron de necesaj lingvoparoj inter kiuj endas traduki. Ankaŭ la programaro por [maŝintradukado](#) ofte uzas (nehoman) pontolingvon. Oni kelkfoje proponas Esperanton kiel pontolingvon, ne nur en normala tradukado, sed ankaŭ en maŝintradukado (kiel en la [DLT-projekto](#)).

Postredaktado 审稿 *Editing*. Kontrolado kaj korektado de la [celteksto](#), kiu estas farita de homa aŭ maŝina [tradukisto](#).

Preterlaso 删减 *Omission*. Manko de signifohava ero en la [celteksto](#), kiu ja ĉeestas en la [fontoteksto](#). Kp. [aldonaĵo](#).

Programkontrolo 程序审查[A] *Program verification*. Kontrolo pri la [fidindeco](#) de [asimilota aŭ asimilita](#) programo. Kontrolo povas okazi antaŭ ol asimili kiel parto de [projektesploro](#) por vidi ĉu ĉiuj necesaj dosieroj estas liveritaj. Kontrolo okazu ankaŭ post la asimilado kiel parto de la [kvalitkontrolo](#), por vidi ĉu la programo bone funkcias, kaj precipe ĉu la uzulinterfaco estas en ordo.

Projektesploro 项目研究 [A] *Project analysis*. Detala esploro de tradukprojekto por decidi pri la plej taŭga maniero de [asimilado](#). Dum la projektesploro oni i.a. nombras la tradukendaĵojn por fiksi la [tarifon](#).

Provlegado 校对 Vidu "[reviziado](#)".

Pruntado 借用 *Borrowing*. Prenado de vortoj el la [fontolingvo](#) sen ŝanĝi ilin.

Prunta traduko 借用译法 Vidu "[paŭsaĵo](#)".

Recikligo 循环利用 *Leverage*. Procezo ĉe la [tradukado](#) de renovigitaj manlibroj aŭ programoj, dum kiu la tradukitaj [segmentoj](#) de antaŭaj versioj estas aŭtomate reuzataj en la nova versio, kiam ili [plene](#) aŭ [svage](#) kongruas kun la segmentoj de la nova versio. Por recikligo oni bezonas [tradukmemoron](#).

Regulita lingvaĵo 受控语言 *Controlled language*. Limigita varianto de homa lingvaĵo, uzata por verki teknikajn manlibrojn kun simplaj frazkonstruoj kaj unusencaj vortoj. [Fontotekstoj](#) en strikte regulita lingvaĵo estas multege pli taŭgaj por [maŝintradukado](#) ol fontotekstoj en neregulita lingvaĵo.

Resuma traduko 缩译 *Condensed translation*. Traduko de la plej gravaj elementoj de la [fontoteksto](#). Resuma traduko utilas, kiam mankas (monaj, spacaj, tempaj) rimedoj por publikigi [celtekston](#), kiu estas same ampleksa kiel la fontoteksto. Kp. [parafrazo](#) kaj [fidindeco](#).

Retrotraduko 回译 *Back translation*. [Laŭvorta traduko](#) de la [celteksto](#), por ke iu, kiu ne komprenas la [arte tradukitan](#) celtekston, havu bonan bildon pri la [fidindeco](#) de la traduko. Se oni ekzemple petas permeson eldoni esperantigitan poemon aŭ kanton, tiam la posedanto de la aŭtorrajtoj povus postuli retrotradukon.

Reviziado 校对 *Proofreading*. Paŝo en la [asimila procezo](#), post la [postredaktado](#) kaj antaŭ la lasta [programkontrolo](#), en kiu oni kontrolas vortrompiĝojn, adaptas la grandecon de dialoguoj por ke la tekstoj bone prezentiĝu, k.t.p. Sinonimo: provlegado.

Ripetaĵo 重复 *Repetition*. Tradukita frazo aŭ termino, kiu jam estis uzita aliloke en la sama tradukprojekto. [Tradukilo](#) traktas ripetaĵojn kiel [plenajn](#) aŭ [svagajn kongruaĵojn](#). Kp. [heredaĵo](#).

Rolinterŝanĝo 角色互换 *Role exchange*. Eraro de [interpretisto](#), kiu transprenas la rolon de unu el la partioj inter kiuj li interpretas. Ekzemplo: interpretisto respondas mem al demandoj por preleganto.

Samtempa interpretado 同声传译 *Simultaneous interpretation*. [Interpretado](#) ĉe kiu la [interpretisto](#) parolas samtempe kiel la parolanto. Kutime oni uzas teknikajn instalaĵojn por ebligi tion. Flustra interpretado estas tipo de samtempa interpretado ĉe kiu oni flustras la tradukon en la orelon de aŭskultanto. Sinonimoj: simultana interpretado, sinkrona interpretado.

Segmento 段 *Segment*. La plej malgranda tekstparto, kiun eblas trakti kiel unuo. [Tradukilo analizas fontotekston](#), dividas ĝin en segmentojn kaj komparas tiujn segmentojn kun la [tradukunuoj](#) en la [tradukmemoro](#). Kutime temas pri kompletaj frazoj.

Senrubigado 清理 *Clean-up*. Forigado de fontolingvaĵoj el la tradukita dosiero. [Tradukilo](#) ofte funkcias tiel, ke dum la tradukprocezo la [fontolingvaj](#) kaj [cellingvaj segmentoj](#) aperas kune en unu dosiero. Dum la senrubigado konserviĝas la cellingvaĵoj kaj la [aspektigaj informoj](#).

Simultana interpretado, sinkrona interpretado 同声传译 *Sinonimoj de samtempa interpretado*.

Sinonimeco 同义 *Synonymy*. La apero de sinonimoj, t.e. malsamaj vortoj kun (pli-malpli) samaj signifoj. Tradukisto ofte uzas sinonimojn responde al specialaj postuloj. Ekz-e por trovi rimvorton, por trovi pli mallongan esprimon pro spacomanko, por fari tekston stile pli kohera, por stile varii, ktp.

Sinsekva interpretado 交替传译 *Consecutive interpretation*. [Interpretado](#) ĉe kiu la interparolantoj regule paŭzas, por ke la [interpretisto](#) povu transdoni la diraĵojn.

Stilgvidilo 风格指南 *Style Guide*. Dokumento, kiu specifikas detalojn pri lingvostilo, aldone al la ĝenerale akceptitaj lingvonormoj. Temas pri la uzo de interpunkciaj signoj, uskloj, propraj nomoj, landonomoj, k.t.p. Se oni tradukas por kompanio, kiu uzas stilgvidilon, oni sekvu ties regulojn. La uzo de stilgvidilo kontribuas al [kohera](#) lingvouzo. Oni bezonas ĝin kiam pluraj tradukistoj kunlaboras en unu tradukprojekto.

Subtitolado, subtekstigado 字幕 *Subtitling*. Kreado de skribaj tradukoj, kiuj aperu ĉe la malsupro de filmaj bildoj. Subtitoloj/subtekstoj aperu samtempe kun la diraĵoj, kiujn ili reprezentas. Pro tio ke la disponebla spaco estas limigita, la tradukisto ofte iom [resume](#) redonu la [fontolingvaĵojn](#). Rimarko: ekvastiĝas la uzo de la termino *subtekstigado* favore al la pli tradicia termino *subtitolado*, ĉar pli kaj pli da homoj opinias la pli tradician terminon nelogika paŭsaĵo el la angla. Kp. [eksterscena voĉo](#).

Svaga kongruaĵo 模糊匹配 *Fuzzy match*. Vorto aperanta en [segmento](#), kiu en svage kongrua formo troviĝas en la [tradukmemoro](#). [Tradukiloj](#) ebligas al tradukistoj la reuzadon de [tradukunuoj](#), kies [fontotekstaj](#) partoj svage (aŭ [plene](#)) kongruas kun la tradukendaj frazoj.

Ŝtopaĵo 占位符 *Placeholder*. Signo, kiun poste anstataŭos senchava vorto, vortero aŭ frazero. Vidu ankaŭ: [kroĉado](#).

Jen frazo kun ŝtopaĵoj:

Ne eblas rekoni la nomon %s; ĝi havu maksimume %d signojn.

Ŝtopaĵoj povas kaŭzi diversajn problemojn ĉe tradukado. Ekzemple jena frazo estas malfacile tradukebla al iuj lingvoj, se la ŝtopaĵo reprezentas diversgenrajn vortojn:

Plenigu la %sn.

Tarifo 翻译价格 *Rate*. Tradukprezo, kies kalkulbazo kutime estas la amplekso de la teksto. La amplekson oni povas diversmaniere mezuri: laŭ nombro de signoj, klavopremoj, vortoj, linioj aŭ paĝoj. Krome, la tarifo povas esti bazita sur la [fontoteksto](#) aŭ sur la [celteksto](#). Tarifo surbaze de la fontoteksto havas la avantaĝon, ke eblas fiksi la prezon antaŭ ol ektraduki. Oni povas rabati pro [heredaĵoj](#) kaj [ripetaĵoj](#). Tiucele [tradukiloj](#) ofte havas specialan funkcion por kalkuli la nombron de [plenaĵoj](#) kaj [svagaĵoj](#).

Tekstvastiĝo, tekstmalvastiĝo 文本扩展; 文本收缩 *Text expansion, text contraction*. Fenomeno, ke [celtekstoj](#) iĝas pli longaj aŭ mallongaj ol [fontotekstoj](#). Tio havas gravajn sekvojn por la [aspektigo](#) de [interfacoj](#) kaj dokumentoj. Necesas anticipi la bezonatan spacon en softvaro (dialoguoj, menuoj), titoloj, tabeloj, diagramoj k.t.p. Pro tekstvastiĝo la preskostoj de celtekstoj povas esti pli altaj ol la preskostoj de fontotekstoj.

Termina administrado 术语管理 *Terminology management*. Preparado de [terminaroj](#) specifaj por unuopa produkto aŭ kompanio cele al [kohera](#) kaj senerara uzado de terminoj. Tiajn terminarojn oni povas uzi por [terminrekonado](#).

Terminaro 术语词典 *Vocabulary*. (1) Faka [vortaro](#). (2) Klariga aŭ tradukita vortlisto kun specialaj vortoj uzataj en specifa verko, ĉe specifa kompanio, produkto aŭ programo. Kp. [glosaro](#).

Termino 术语 *Term*. Vorto aŭ esprimo speciala al iu fako, produkto aŭ kompanio.

Terminrekonado 术语识别 *Term recognition*. La procezo ĉe kiu [tradukilo](#) aŭtomate kontrolas, ĉu en la tradukata [segmento](#) aperas [terminoj](#), kiuj troviĝas en [terminara](#) datenbazo, kiu estas ligita al ĝi.

Tezaŭro 词库 *Thesaurus*. [Vortaro](#) per kiu oni povas trovi vortojn laŭ senco. Tezaŭro estas grava helpilo dum tradukado por trovi ekzemple sinonimojn aŭ antonimojn. Ekz-o: [Tezaŭro de Tejo](#).

Tradukado 翻译 *Translation*. Transigado de teksto aŭ parolo de unu lingvo en alian, anstataŭigante vortojn kaj esprimojn de unu lingvo per samsencaj vortoj aŭ esprimoj de la alia.

Tradukilo 翻译记忆软件 *TM software*. Programo kiu helpas tradukiston dum la tradukprocezo kaj kiu estas bazita sur [tradukmemoro](#). Ekzemploj de tradukiloj estas TRADOS, SDLX, Déjà Vu kaj OmegaT. Sinonimoj: [tradukmemoro \(2\)](#), tradukhelpilo, TM-programo, TM-softvaro.

Tradukisto 翻译家, 译者 *Translator*. Iu, kiu [tradukas](#).

Tradukmemoro 翻译记忆, 翻译内存 *Translation memory (TM)*. (1) Datumbazo kun [tradukunuoj](#). Se la tradukmemoro estas servila (TM-servilo), pluraj tradukistoj povas utiligi la saman tradukmemoron. (2) [Tradukilo](#) kiu helpas tradukiston apliki tian datumbazon. — Aplikante tradukmemoron oni povas pli rapide kaj pli [kohere](#) traduki, uzante [heredaĵojn](#) kaj [ripetaĵojn](#).

Tradukunuo 翻译单元 *Translation unit*. Tradukunuo konsistas el [fontoteksta segmento](#) kaj kunligita [celteksta](#) segmento. Tradukunuoj formas la bazajn unuojn de [tradukmemoro](#).

Transliterado 转拼 *Transliteration*. Sentraduka anstataŭigado de literoj de [fontolingva](#) vorto per respondaj [cellingvaj](#) literoj, sen konsideri la prononcon. En Esperanto oni povus transliteri por indiki ekz-e Rusajn proprajn nomojn. Transliterado okazas ankaŭ inter lingvoj kun Latinaj alfabetoj: la Germana nomo "Göte" translitereblas per "Goete". Komparu: [transskribado](#).

Transponado 转换 *Transposition*. Ŝanĝo al alia gramatika kategorio dum la tradukado. De tempo al tempo tradukisto devas transponi por ke la lingvaĵo en la [celteksto](#) restu same [flua](#) kiel la [fontoteksto](#).

Transskribado 转写 *Transcription*. Sentraduka fonetika reprezentado de [fontolingva](#) vorto en la [cellingvo](#). En Esperanto oni povus transskribi por indiki ekz-e Ĉinajn proprajn nomojn. Transskribado okazas ankaŭ inter lingvoj kun Latinaj alfabetoj: la Germana nomo "Göte" transskribeblas per "Gete". Komparu: [transliterado](#).

Tutmondigo 全球化[A] *Globalization*. Kreado de mondscale disvastigeblaj komputilaj programoj. Uzataj teknikoj: sentekstaj interfacoj aŭ [internaciigo](#) kaj [asimilado](#).

Unikodo 统一码 *Unicode*. Norma signaro entenanta teknikajn simbolojn kaj la alfabetajn signojn de praktike ĉiuj homaj lingvoj. La uzo de Unikodo faciligas la kreadon de plurlingvaj dokumentoj kaj programoj. La uzo de Unikodo estas grava elemento ĉe la [internaciigo](#) de programoj.

Unulingva tradukkompanio 单一语言服务商 *Single language vendor*. Tradukkompanio kiu tradukas tekstojn kaj [asimilas](#) programarojn en unu lingvon. Ĝi ofte subkontrakte kunlaboras kun [plurlingvaj tradukkompanioj](#). Ofte temas pri unuopulo, kiu tradukas en sian denaskan lingvon. Ekz-o: *Tekstoj*: <http://www.tekstoj.nl>.

Uskleco 大小写 *Case*. La uzo de majuskloj kaj minuskloj. [Stilgvidilo](#) preskribu ekzemple la usklecon de popolnomoj kaj monatomoj.

Uzulinterfaco 用户界面[A] *User interface*. Interfaco per kiu uzuloj povas vidi informojn de komputila programo kaj povas elekti opciojn. Tradukado de interfacoj estas speciale malfacila, ĉar ofte oni tradukas sen vidi la [kuntekston](#). Oftas komplikaĵoj kiel markado de [klavkomandoj](#) kaj [kroĉado](#). Ĉe la tradukado de uzulinterfacoj do speciale gravas la fazoj de [reviziado](#) kaj [kvalitkontrolado](#).

Vortaro 字典 *Dictionary*. Alfabeto ordigita listo de vortoj kun informoj pri iliaj signifo kaj uzo. Vortaroj povas esti unu- aŭ plurlingvaj. Vortaroj povas esti ĝeneralaj aŭ fakaj. Fidindaj vortaroj estas nemalhaveblaj helpiloj por tradukistoj. Troviĝas granda kolekto de vortaroj en la retpaĝo [Ligoj pri tradukado](#). Komparu: [terminaro](#).

Vort-post-vorta traduko 逐字翻译 *Word for word translation*. Formo de [laŭvorta traduko](#) ĉe kiu ĉiu unuopa vorto estas aparte tradukita.

La siglo **[A]** indikas, ke temas pri termino, kiu estas specifa por tradukado kaj asimilado de komputilaj programaroj.

Kelkaj uzitaj fontoj:

- [ReVo](#)
- [Komputada Leksikono](#) de Sergio Pokrovskij
- [Translation Glossary](#) de Wayne Lemman
- [Gramatiko de Esperanto](#) de Miroslav Malovec
- *A Practical Guide to Localization* de Bert Esselink